

# Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin Vol 48, N° 3 (2009/3)



*Maldekstre, malsupre:*  
Darcy ROSS, Bryan  
ANDERSON, Tim RACKOW  
(Fotoj de David T. KOCH)

*Dekstre:* Jeff WILSON,  
Jerry JOHNSON (Foto  
de David DOUGHERTY)

## Raporto pri la Landa Kongreso (pĝ. 7)

**Ankaŭ ĉi-numere:** AAIE: *Esperanto classes and the Internet* • *Demandu:* Kio okazas en la novjorka oficejo de UEA? • *En la ĉielo:* La reĝoplanedo alvenas • Traduk-interŝanĝo el Ĉeĥujo: *Ulrika* • *Traduku:* legantoj traktas la poemon *Praise song for the day* • kaj pli...

# Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 48, No 3

Redaktisto • *Editor*: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero • *Editorial  
deadline for the upcoming issue:*

**la 25-a de Julio 2009**

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn aŭ en Esperanto aŭ en la angla lingvo. Bonvolu aldoni viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de kaj fotinto kaj fotito(j), la loko, kaj la dato. Ni perpoŝte resendos materialojn nur se vi aldonis mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el la bulteno kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimataj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne prepe prezentas vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.

*We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subject(s), the location, and the date. Materials will be returned by mail only if you have included a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint content from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*

★★★

**Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA**

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

**Direktoro • *Director***, CO: William B. HARRIS

**Prezidanto • *President***: Philip G. DORCAS

**Vicprezidanto • *Vice President***: Tim WESTOVER

**Sekretario • *Secretary***: Julie SPICKLER

**Kasisto • *Treasurer***: ???

**Aliaj estraranoj • *Other board members***: Jenja AMIS, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, ROS Haruo, Tor KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie WINBERG, Christopher ZERVIC

## Ĝustatempa UN/UEA-novaĵo

Alvenis al la redakcio multe da informo ĝustatempe por la nova rubriko *Demandu al Usona Esperantisto*. Ĝus post kiam oni starigis la unuan demandon (pri la novjorka oficejo de UEA) okazis multaj raportindaĵoj tie: vizito de Esperanto-grupo, prelego de Humphrey TONKIN, eĉ futbal-maĉo(!) kun la Ĝenerala Sekretario. Vidu la ĉi-numerajn raportojn, kiujn afable verkis por ni Neil BLONSTEIN.

Redaktiste via, Hoss FIROOZANIA

### Two ways you can help others learn Esperanto:

1. If you find someone who seems interested in learning but doesn't have access to a computer or a local class, mention the beginner's correspondence course available from Esperanto-USA. The fee is \$63 and includes all study materials and a personal tutor. An application blank is available from the central office. If the \$63 fee is a handicap, tell the prospective student to apply for a scholarship.
2. Make a donation to Esperanto-USA's Goldman Fund, which provides scholarships for prospective students in levels 1 and 2 of the correspondence-courses.

Need more information? Contact Dorothy Holland, at <dorothyjeanh@gmail.com>, or by phone at 805-967-5241.

## Ĉiam indas membriĝi

La 19-an de Majo mi ricevis dumvivan aliĝilon (kotizo: \$800) de usonano kiu jam atingis 78 jarojn. Mi atendas dumvivan aliĝilon de eĉ pli aĝa Esperantisto!

—Vilĉjo HARRIS, Direktoro, CO

**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly newsletter, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return this form with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone & Fax: \_\_\_\_\_

E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (M/D/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_ Ham radio call: \_\_\_\_\_

In the membership list, don't publish my:  address  phone  fax  email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

- Life (*birthdate required*)..... \$800.00
- Sustaining..... \$80.00
- Family..... \$60.00
- Individual..... \$40.00
- Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00
- Limited Income..... \$20.00
- Friend of Esperanto..... \$10.00

(*not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter*)

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

## Esperanto-USA serĉas novan kasiston

Esperanto-USA bezonas novan kasiston. Se tiu posteno interesas vin, bonvolu mesaĝi al prezidanto Filipo DORCAS ĉe <[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)>. Li resendos priskribon de la taskoj.

Antaŭa kasisto Anna BENNETT kaj direktoro de la Centra Oficejo Vilĉjo HARRIS helpas la novan kasiston. La kasisto estos estrarano kaj servos kiel membro de la estraro same kiel la aliaj estraranoj. La deĵoro (serv-periodo) daŭros tri jarojn, ĝis la landa kongreso en 2012. La prezidanto respondos al viaj demandoj laŭ bezono. Ĉu vi volas helpi al Esperanto-USA tiurilate? Ni jam aprobis la buĝeton por 2010. Se la prezidanto nomos vin la kasisto, vi komencos la laboron tuj. Ni petas vian helpon. Dankon.

## Vizito al la UEA-oficejo



Vizitantoj en la UEA-oficejo ĉe UN. (Foto: Steve BREWER)

### Raportis Neil BLONSTEIN

Pro la vizito de honora gasto Maŭro LA TORRE kun familio el Romo, la novjorka oficejo de UEA ĉe la Uniĝintaj Nacioj (UN) ricevis grupon de esperantistoj sabaton, la 11-an de Aprilo: Sofiya SOSKINA (plentempa laboristino ĉe UNICEF/najbara konstruaĵo), Daniel CUTHBERT (iama estro de junularaj usonaj esperantistoj), Steven BREWER (el Amherst, MA), Sally LAWTON (el Westhampton, MA), Jakobo SCHWARTZ (el Waltham apud Bostono, MA), Laŭra LA TORRE (filino de Maŭro), kaj Margorita LA TORRE (edzino de Maŭro).

Dum partoj de la tago, kiam ni estis ĉe turismejoj aŭ restoracioj, aldoniĝis lokanoj Scott PAGE, Carlos ORTIZ, kaj Arnoldo VICTOR. Inter diversaj turismaj agadoj ni vizitis lokan kurson de Tomaso ECCARDT kun kvar studentoj.

Ni vizitis televidan/gazetan presejon kun grandega globo de la tero, naturmuzeon, artaĵon ĉe la dua plej fama konstruaĵo de la urbo (*Chrysler*) kaj, malgraŭ pluvo, parkojn apud UN.

Daniel gvidis nin en la plej luksan stacidomon *Grand Central*. Interese la stacido-

mon subvenciis Cornelius VANDERBILT, kies familiano Alice VANDERBILT jarcenton poste estis fervora subtenanto de la ideo de internacia lingvo. Pro ŝi restas iom serioza kolekto pri la temo, inkluzive esperantaĵojn, ĉe la urba esplor-biblioteko, kilometron for de la stacidomo.

Kelkaj el ni renkontiĝis kun Maŭro pasint-semajne. La tago finiĝis ĉe la kafejo "Esperanto Cafe".

## TONKIN prelegas pri UEA/UN

### Raportis Neil BLONSTEIN

Humphrey TONKIN prelegis ĉe la formala monata aprila renkontiĝo de la Esperanto Societo de Novjorko. Alvenis dek ok esperantistoj, inkuzive de universitata profesorino pri indiĝenaj lingvoj Miryam YATACO kaj UN-representanto por Servas (simila al Pasporta Servo) Noema CHAPLIN.

D-ro TONKIN parolis pri la lingva politiko de UN kaj la rilato de Esperantistoj al UN. Neforgeseblaj nomoj en tiu historio estas Ambasadoro Ralph HARRY kaj longtempa motoro de la novjorka movado Mark STARR. Ekde la jaro 1979, la oficejo en Novjorko havis kelkajn dungitojn (unu el ili, Nancy MEDRANO, alvenis) sed precipe multajn volontulojn, plej longe inter ili Rochelle GROSSMAN. La aŭtoro nun voluntulas jam naŭ monatojn. Humphrey kuragiĝis la restarigon de ses-homa estraro de *Universal Esperanto Association of New York* (leĝe rekonata organizo). Estis diversaj pozitivaj reagoj. La tuta prelego estas rete havebla.

[Por legi la tekston de la prelego de d-ro TONKIN, bonvolu sekvi la ligilojn malsupre en pĝ. 6. —Red.]

## Demandu al Usona Esperantisto

*En ĉi tiu rubriko ni serĉos respondojn por viaj demandoj pri lingvo, gramatiko, kulturo, literaturo, historio, ktp. Ĉu vi volas proponi demandon? Nepre sendu ĝin al la redakcio!*

*La unuan demandon por la rubriko sendis al ni leganto Maya KENNEDY, kiu demandis pri la Novjorka Oficejo de UEA. Kion oni faras tie? "Por mi, kaj eble por aliaj legantoj," skribis Maya, "ĝi estas mistero. Eble ĝi ricevos pli da subteno se usonaj esperantistoj komprenus ĝin pli bone." Trafe dirite. Ni petis respondon de Neil BLONSTEIN, volontulo en la oficejo. Li afable sendis al ni la jenan informon:*


1. La oficejo de UEA troviĝas unu minuton for de la enirejo de UN en *Church Center* aŭ *777 UN Plaza*. (Telefona: 212.687.7041) Eble kvinono da mia agado estas tie, ĉar kvardek Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO-oj) ligataj al religioj kaj pacaktivistaj grupoj (kiuj serĉas rilaton kun UN) troviĝas en la konstruaĵo. Mi tie ekkonas meze cent homojn semajne aŭ disdonas similan numeron da informiloj pri Esperanto. Same UEA iam aŭspiciis tie jarajn konferencojn kun cento da partoprenantoj (duono estis esperantistoj, duono UN-laboristoj). Malpli granda evento estas pripensinda en estonteco.

2. Kelkcent libroj en aŭ pri Esperanto troviĝas ĉe la oficejo kiel malgranda ekzemplo de la movado. Laŭ intereso, mi montras parton aŭ la tuton al diversaj invititoj, ĉu politikaj aktivistoj, religiaj aktivistoj aŭ aktivistoj de NRO-oj. Ankaŭ kelkaj grupoj de esperantistoj vizitas kun antaŭa anonco. Laŭ tradicio de Rochelle GROSSMAN, antaŭa volontulo de UEA/Novjorko, mi prizorgas la gastlibron.

3. Post unu- aŭ du-hora zorgado de

poŝto kaj kvitancoj ĉe la oficejo mi iras al UN. Mi jam preskaŭ jaron posedas rajtigiton partopreni dekojn da renkontiĝoj semajne interne de UN. Per tio mi ekkonis ĉirkaŭ kvindek vizitantajn parlamentanojn kaj kelkdek Ambasadorojn kaj Vicambasadorojn de UN. Mi mencias UEA-n kaj Esperanton en konversacioj kaj foje antaŭ centoj da homoj. Kelkminutaj konversacioj pri Esperanto jam okazis kun pola ambasadoro, aŭstralia ambasadoro, tanzania ambasadoro kaj aliaj. Foto de mia renkontiĝo kun Ĝenerala Sekretario BAN Ki-moon estas ĉe mia anglalingva blogo [vidu ligilon en pĝ 6].

4. Prelegoj ĉe UN rilatas al diversaj temoj: paco, virinaj rajtoj, interkompreno ĉe religioj, holokaŭstaj memoraĵoj, indiĝenaj rajtoj, ekologiaj problemoj, kaj internacia



Brita Ambasadoro John SAWYERS, Ĝenerala Sekretario de UN BAN Ki-moon, kaj UEA-representanto Neil BLONSTEIN, kiuj kune partoprenis "diplomatan" futbal-maĉon la 25-an de Aprilo por subteni karitatan fonduson. (Foto: Neil BLONSTEIN)

sporto kiel pacilo. Ĵaŭde okazas regula, plurhora, kaj foje tut-taga prelegaro organizita de Departamento de Publikaj Informoj kaj tiam estas aparte oportuna tempo kontakti aliajn neregistarajn organizojn. Elstaraj estas miaj amikaj kontaktoj kun reprezentanto de Servas, Noema CHAPLIN, Itala Radikala Partio—konata subtenanto de Esperanto (Federica kaj Serena, staĝistinoj), Pensiula Organizo (AARP), kaj Ed RYAN. Duono de la prelegantoj estas universitataj profesoroj kaj triono de la aŭskultantoj estas studentoj. Kelkaj famaj ĵurnalistoj estas ankaŭ kontaktitaj tie.


5. Post prelego ĉe la novjorka klubo (24-an de Aprilo) fare de Humphrey TONKIN, ni zorgas elekti ses-homan estraron de *Universal Esperanto Association of New York* kun la partopreno de Humphrey kaj mi. Tiu estraro devas ankaŭ zorgi pri la ekonomia stabileco de la oficejo (lukosto, telefono, kaj kopioj por informiloj).

6. Mi posedas personajn kartojn de ducent gravuloj, membras en dudek fakdiskutgrupoj kaj informas esperantistojn ĉirkaŭ la mondo pri UEA-agado. Mi serĉas kunlaborantajn esperantistojn por skribi al diversaj konktaktindaj homoj.

7. Gravaj ret-kontaktoj miaj estas kun la UN-reprezentantoj de Ĝenevo kaj Aŭstrujo, Stefan KELLER kaj Michael MAITZEN. Preskaŭ tage mi skribas ĉe reŭlisto pri UN-agado. Aliĝu se vi interesiĝas pli detale!

## Ligiloj:

- <http://EsperantoFriends.blogspot.com>
- <http://esperanto-usa.org/en/node/1463>
- <http://groups.yahoo.com/group/agado-cxe-unesko-kaj-UN>



## Korespondon deziras

**Bosse Alexis, <bossealexis@yahoo.fr>**  
**tel. 00229 93 0101 16/ 97 85 09 12**

Fraŭlo de 35 jaroj kun tri infanoj ŝatus koresponde amikiĝi kun usona virino inter aĝoj 20–40, kiu emas vojaĝi kaj ŝatas afrikan vivon. Mi flue parolas la francan, meze la anglan kaj elemente Esperanton. Mi havas belan domon kaj veturilon, komercindustrion kaj lernejdomon. Mi respondecas pri projektoj en Afriko, ĉefe en Benino. Mi dolĉamane bonvenigas mian koran fratan amikino kun varma brakumo.

## Forpaso: Robert SMALES

Dumviva membro Robert SMALES forpasis la 12-an de Februaro, 2009 en King, Norda Karolino. Li havis 60 jarojn. Li laboris kiel vicdirektoro de la Centra Oficejo de ELNA en 1988 kaj 1989.

# Mia reago al nia kongreso

La ĉi-jaran kongreson mi trovis tre interesa kaj mi vere ĝuis ĝin. Mi dankas al Ron GLOSSOP kaj la aliaj prizorgantoj (Duncan CHARTERS, Dave FALLERT, Jerry JOHNSON kaj Jeff WILSON) pro la laboro farita.

Plej impona por mi estis la prelego de Katalin KOVATS (el Nederlando) pri edukado.net per *Skype* fare de Duncan CHARTERS. Pli pri tio poste.

Larry kaj mi alvenis ĵaude, ĉar mi volis alveni sufiĉe frue por partopreni la estrarkunsidon, kiu komencis vendredon je la 8-a matene. La estraro diskutis kelkajn aferojn kaj ŝajnas al mi, ke la laboro bone progresis. Posttagmeze dum ni daŭrigis la kunsidon, Larry partoprenis la ekskurson al la arkego. Humphrey TONKIN venis por paroli al la estraro pri eventuala kunlaboro de Esperanto-USA kaj *Esperantic Studies Foundation*.

La programaro sabate komenciĝis je la 8:30 matene. Mi tiom interesiĝis pri la programeroj, ke mankis tempo eĉ iri trovi akvon por trinki: kiam alvenis la vespero la kapdoloro komenciĝis.

La perretaj kontaktoj kun alilandanoj estis interesaj. Duncan CHARTERS antaŭe aranĝis la aferojn: Uzante lian ekipaĵon, la partoprenantoj de la programero interparolis per *Skype* kun aliaj grupoj en Brazilo, Meksiko kaj Ĉinujo. Sed por mi, plej impona estis la aranĝo kun Katalin KOVATS. Ŝi parolis pri sia laboro kaj retpaĝaro edukado.net. Vere estis kiel instruado pere de komputilo, sed la impona afero estis, ke ŝi ne estis en la ĉambro aŭ eĉ en la lando, sed en alia parto de la mondo: en Nederlando, fakte. Do finfine mi vidis bone prezentitan prelegon (instruadon) pere de

## Anna BENNETT

Anna loĝas kun sia edzo Larry en Boise, Idaho.

[annambennett@yahoo.com](mailto:annambennett@yahoo.com)



*Skype*. Pro tio, ke la ekipaĵo en ambaŭ lokoj (Nederlando kaj en nia ĉambro en Sankta Luiso) estis bonkvalitaj, oni bone aŭdis ĉion, kaj la prezento estis klara. Finfine mi vidis la realon, kion mi antaŭe opiniis nur ebla. Ni vidis la antaŭe preparitan informon montrante la enhavon de la paĝaro kaj kiel aspektas kelkaj paĝoj. Samtempe sur la ekrano ni vidis ŝin dum ŝi parolis al ni. Poste mi parolis iomete kun S-ro CHARTERS, kaj eksciis, ke mia nova "Eee PC" (tiel nomata "netbook" tekkomputileto) ŝajne estas sufiĉe bonkvalita por uzi sukcese la *Skype*-programon. Do mi venis el la kongreso finfine preta ekuzi *Skype*-sistemon. Mi poste parolis kun Daĉjo DOUGHERTY, kiu promesis helpi min enskribiĝi por komenci fari tion. Ni unufoje provis fari tion, sed ĝuste tiam mankis retaliro, kaj poste mankis tempo. Vere estis tiom da interesaj programeroj, ke mi havas longan liston da aferoj por fari nun, reveninte hejmen.

Lusi HARMON raportis pri la stato de *Pasporto al la tuta mondo* kaj ties uzo en la reto. Vilĉjo HARRIS parolis pri la aferoj ĉe nia Centra Oficejo. Mi supozas, ke iliaj raportoj aperos ie alie, ĉar ili bone sciigas la membraron pri la aferoj de la CO kaj "Pasporto". Do mi ne parolos pri tio, ĉi tie.

Boris KOLKER parolis pri modernaj rimedoj por reteni homojn en Esperantujo. Poste li gvidis diskuton pri la temo. Pro tio, ke partoprenis multaj junuloj, la temo estis aparte taŭga dum la kongreso. Estis vere kuraĝige vidi tiom da junuloj ne nur partopreni la kongreson, sed ankaŭ ekagi por Esperanto-USA kaj por Esperanto generale.

Vespere Lusi HARMON gastigis la kutiman akcepton por UEA-delegitoj, anstataŭ Vilĉjo HARMON, kiu bedaŭrinde ne partoprenis la kongreson. Ni diskutis la uzon de la reto eĉ tie dum la akcepto.

Tuj poste okazis la bankedo kun bongustaj manĝaĵoj kaj agrablaj kunĉeestantoj. Larry kaj mi gajnis t-ĉemizojn kaj libron dum la aŭkcio, sed revenis al nia ĉambro eĉ antaŭ la fino ĉar estis por ni tro malfrue kaj ni estis lacaj. Ni do ne partoprenis la ludojn ka distraĵojn, kiujn gvidis Sherry WELLS, Aminda DIEHL kaj Darcy ROSS.

Ni iom pli malfue ellitiĝis dimanĉe ĉar ne okazis programeroj matene. Tamen ni ja partoprenis neoficialan Di-servon gvidata de Filipino DORCAS, en kiu ni diskutis kelkajn elektitajn partojn el la Biblio. Post tio ni matenmanĝis—tre malfrue, ĉar ni eliris la kafejon preskaŭ la 12-an.

La unua programero dimanĉon estis la prelego de Boris KOLKER pri sia libro *Vojaĝo en Esperanto-Lando*. Poste li subskribis librojn por tiuj, kiuj kunportis ekzemplerojn. Li imponis min, kiam mi alproksimiĝis por peti subskribon kaj li memoris ne nur mian familian nomon (aperis nur la antaŭnomo sur la nomŝildo) sed ankaŭ la nomon de Larry.

Alia interesa programero por mi estis la diskutrondo pri Esperanto kaj Interreto, gvidita de Steven BREWER. Ni diskutis

demandojn pri bezonoj, retaj solvoj kaj defioj en kvar grupoj: lokaj grupoj, ĉe la landa nivelo, por la Amerikoj, kaj en la mondo. Ĉiuj temoj ŝajnis al mi interesaj, sed mi devis elekti unu el ili, do mi partoprenis tiun pri la lokaj grupoj, ĉar tiu estis por mi la plej grava nuntempe. La diskuto estis vigla kaj helpa, kaj mi surpriziĝis, kiam Steven anoncis, ke restas nur kvin minutoj. Poste la resumoj estis interesaj, tamen mi atendas la skribitajn resumojn, espereble post nelonge.

Ellen EDDY parolis pri NASK kaj la defioj nuntempaj. Tuj poste Mar CARDENAS parolis pri sia agado kun skoltinoj. Ŝi eĉ kantigis nin.

Ni eĉ spektis filmojn vespere en Esperanto. Duncan CHARTERS kunportis kelkajn kaj ankaŭ Mar CARDENAS. La plej amuza por mi estis tiu pri la lingva ekzameno de ZAMENHOF mem. Mi devas konfesi, ke mi ne konsciis, ke alia skeĉo temis pri la komenco de la zamenhofs *Krestomatia*, ĝis post Duncan CHARTERS demandis, ĉu iu rimarkis tion. Denove la tago estis tiom plena, ke ni du finfine foriris al nia ĉambro antaŭ ol la filmo-spektado finiĝis.

La kialo de la tre okupado dum la kongreso ne estis nur la programeroj. Ankaŭ la alia afero, kiun mi ĝuis, estis la okazo paroli kun multaj amikoj, kiujn mi havas pro Esperanto kaj la kongresoj, kiujn mi antaŭe partoprenis. Mi nun havas eĉ pli da amikoj, danke al ĉi tiu kongreso.

Dum la solena fermo Filipino DORCAS anoncis, ke la venontjara kongreso okazos en Vaŝingtono, D.K. Do la laboro por la venonta kongreso jam komenciĝas. Ankaŭ daŭras la laboro de la estraro kun la novaj estraranoj.

Ĝis la venonta kongreso! ★



# Esperanto Classes and the Internet

When I was in the Navy, a machinist's mate on my ship once asked me if I knew why they couldn't let boiler technicians take breaks. (Boiler technicians make steam; machinist's mates run the engines that use the steam to power the ship's screws. In their spare time they all make up jokes about each other.) Playing my role as straight man, I asked why BTs weren't allowed to take breaks. "It's too expensive to retrain them!" he told me.

And that, basically, is a problem with traditional classroom-based language courses. When it comes to language, we all tend to forget what we've learned unless we use it soon enough and often enough to fix it in our memory. That's why an intensive course like the North American Summer Esperanto Institute (NASK) at UCSD is so useful: Each class meeting lasts a few hours, they take place every day, and there are plenty of opportunities to practice outside of class.

Unfortunately, most Esperanto classes meet for just an hour or two at a time and as little as once a week. It would be surprising if students didn't forget a fair amount in the meantime. The solution is that word dreaded by every student: homework.

Today, fortunately, we're not limited to doing exercises out of a textbook. The Internet has transformed language teaching, and it's even possible to learn Esperanto interactively for free thanks to resources like the remarkable website **Lernu.net**. There you'll find an impressive and growing number of Esperanto courses together with many other learning aids,



**D. Gary GRADY**

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgary@mindspring.com](mailto:dgary@mindspring.com)

including tests, on-line dictionaries, short videos, and the ability to exchange instant messages with other students and more experienced Esperanto speakers.

Lernu doesn't make traditional classes obsolete, of course. Live and in person is still the best environment to develop speaking skills. And just as important, taking a class that meets regularly helps students stay motivated. But Lernu.net and classroom courses can work very well together—better than either alone, in fact.

Before you teach your next course, get familiar with Lernu. There's so much there that at first you'll probably feel overwhelmed. Eventually you'll probably want to pick a course that's appropriate to the class you're teaching. In an introductory course, for example, you might want to use *Ana Pana* as homework, supplemented by other material on the site. Adjust your lesson plan to cover the same grammar and vocabulary as in the Lernu course, but in your own style. Approaching the same material two different ways can help clear up confusion, and variety makes things more interesting.

Today's teachers routinely stay in touch with their students via the web and email, providing encouragement and sending gentle reminders of homework, complete

with links so all the student has to do is click. You can set up a free combination web page and mailing list for a course on Yahoo! or Google among other places. You might even consider sending a very short email every day. Just don't overdo it. It's probably a mistake to try to conduct the equivalent of an immersion course by email. It's enough to have them think about Esperanto for a few minutes every day between class meetings.

Of course, Lernu isn't the only Internet resource useful for teaching Esperanto. **Edukado.net** is another source with a wealth of useful content for Esperanto teachers and students. The website of *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo* (**icxlm.org**) focuses on teaching for children. And I'd be remiss not to mention the obvious: **esperanto.net** (many useful links) **esperanto-usa.org**, **UEA.org**, and **AAIE.us** (the website of the American Association of Teachers of Esperanto, which we're slowly expanding).

Nor is Esperanto confined to Esperanto websites. **YouTube.com**, for example, has a growing number of short films in and about Esperanto. (As of mid-May, searching for "Esperanto" on YouTube turned up more than 3000!) You can find numerous Esperanto radio programs and podcasts—including at least a few video podcasts—on iTunes and other sources. (Googling for the word "podkasto" turns up more than 38,000 web pages.)

**Skype.com** is a well-known service that lets you make telephone calls via the Internet. You can even make conference calls, with all your students connected at once, and as long as everyone is using Skype rather than a regular telephone, the

service is free. (You will need some kind of microphone or headset.)

Skype even allows you to make free video calls, so you can see as well as hear the other person. All you need is a reasonably fast Internet connection and a webcam. A webcam is a tiny video cameras for use on the Internet. They're now built into many laptops and some desktop computer monitors, and you can buy an add-on webcam for well under \$100. (For higher quality you can attach a digital camcorder to your computer, but this can be a little more complicated to set up.)

Imagine letting your students talk to an Esperanto-speaker in another country, face-to-face, during class. Or seeing and talking with students in another Esperanto class in another country.

**Oovoo.com** is a similar service that does Skype one better: While Skype presently permits only two-way video calls, Oovoo lets up to six people take part in a video conference. With Oovoo or a similar service, you even could conceivably conduct a small course entirely on line, with the teacher and up to five students seeing as well as hearing each other.

Sites like **UStream.com**, **BlogStar.com**, and **Stickcam.com**, among others, even let you set up your own Internet television station, for free, so you can broadcast live Esperanto classes or sessions at meetings and kongresoj to as many people who tune in via the web. You can even record your programs for rebroadcast later, creating your own reruns! While this is not quite as interactive as a video conference in which everyone is visible on the screen,

viewers can call in by phone or send text messages. With at least some of these services you can even switch between cameras in different locations, even on different continents. Of course, the fancier you get, the more technical complications you have to contend with, but young kids are doing it, so all you need is some smart young kids to help.

And then there's **SecondLife.com**. If you haven't seen it, Second Life is a bit hard to describe. It calls itself as "the Internet's largest user-created, 3D virtual world community." Roughly speaking, it's like a video game where you control a character on the screen and interact with other characters representing other people on the Internet. But it's not a game in the usual sense. It's a virtual world you can explore along with thousands of other participants from all over the Earth. It has become so popular that businesses have opened branches in Second Life to showcase their products, and some companies conduct virtual meetings and seminars in this alternative world. As with the other services mentioned here, basic membership is free.

As you might expect, Esperanto-speakers taking part in Second Life hold virtual kongresoj and teach virtual Esperanto courses. For a good introduction to Second Life in Esperanto, search for the short film "Dua Vivo" on YouTube. Also trying Googling for "Second Life Esperanto".

What on line resources have you found useful in teaching or learning Esperanto?



## En la ĉielo

*Dum 2009 la UN kaj aliaj internaciaj asocioj festas la Internacian Jaron de Astronomio. En ĉi tiu rubriko ni traktas diversajn aktualaĵojn el la ĉielo de la norda duonsfero. Por ke ĉiuj povu partopreni, ni traktos ĉefe aferojn videblajn per nur nuda okulo aŭ simpla binoklo.*



Ekde komenco de somero en la norda duonsfero, la majesta flav-oranĝa Saturno iom post iom malaperas en la vesperan krepuskon. Ĝi restos kaŝita en la sunbrilo ĝis aŭtuno, kaj finfine reaperos en la orienta, frumatena ĉielo. Nun atendas ĝin tie la ĉiam brila Venuso kaj malhele palruĝa Marso, ambaŭ en la konstelacio Taŭro.

Ĉu vi memoras Taŭron? Ni vidis ĝin alte en la vespera ĉielo pasintvintre. Ĝia plej brila stelo estas Aldebarano, giganto kies ruĝ-oranĝa aspekto bele pariĝas kun Marso. Kaj ne malproksime troviĝas la stelgrupo Plejadoj, alia vidindaĵo kiun ni renkontis antaŭe.

La luno vizitos Taŭron **frumatene la 18-an kaj 19-an de Julio**, samtempe indikante la ĝeneralan lokon kie nun situas Marso kaj Venuso (*vidu p.12*).

La noktan ĉielon nun regas Jupitero, la plej granda planedo de nia sunsistemo. Ĝia maso estas pli ol duoble pli granda ol





la maso de ĉiuj la aliaj planedoj kune—do iasence ĝi meritas la reĝan nomon, kiun donis al ĝi la romianoj, ĉu ne?

Ĉi-somere, Jupitero leviĝas en nia orienta ĉielo preskaŭ meznokte, kelkajn horojn post sunsubiro. Dum Junio ĝi estas relative brila kaj facile trovebla inter la malhelaj konstelacioj Akvisto kaj Kaprikorno. Kiel helpema montrilo, nia tiam krescenta luno vizitas la saman regionon de la ĉielo **la 9-an, 10-an, kaj 11-an de Julio** (vidu pĝ. 11).

Antaŭ 400 jaroj, Galileo GALILEI estis la unua (aŭ eble la dua) astronomiisto vidi Jupiteron helpe de teleskopo. Flanke de ĝi, li trovis kvar etajn astrojn en linio—ĉiam apud la planedo, sed en malsamaj ordoj de nokto al nokto. Post zorga observado li konstatis, ke ili fakte estas *lunoj* orbitantaj Jupiteron, samkiel nia Luno orbitas Teron. Tiu observo montris, ke ekzistas pluraj orbitataj objektoj en nia sunsistemo—kiel konjektis la suncentra teorio de Koperniko.


Depost la 17-a jarcento, kaj helpe de diversaj sondiloj, oni nun nombras pli ol 60 lunojn ĉirkaŭ Jupitero. Kvankam oni bezonas teleskopon por vidi la kvar “galileajn” lunojn, per binoklo videblas kutime unu, kaj foje eĉ du. ★

## Malkovru la “galileajn lunojn”



Skizo de Jupitero (cirklo) kaj kvar misteraj astroj. El *Sidereus Nuncius* de G. GALILEI, 1610.

Ĉiunokte dum du semajnoj en 1613, Galileo desegnis la suban observo-serion de Jupitero kaj ties kvar ĉiam apudaj astroj. Sekvante iliajn moviĝojn de nokto al nokto, Galileo konstatis, ke ili efektive estas lunoj kiuj ĉirkaŭiras la planedon laŭ orbitoj de diversaj radiusoj.



El *Istoria e Dimostrazioni intorno alle Macchie Solari* de Galileo GALILEI, 1613

Kvankam ĝi eble ne estas tuj evidenta, ian *ordon* malkaŝas zorga rigardado—ĉu vi vidas ĝin? Rimarku la plej maldekstran punkton en la unua linio, kaj sekvu ĝian helican vojon sube, kie ĝi iras unue maldekstren, poste dekstren, preter Jupiteron, kaj maldekstren denove. Hodiaŭ oni konas ĝin per la nomo *Kalistoo*. Ĝi estas la plej malrapida el la kvar galileaj lunoj, videblaj per simpla teleskopo. (Oni povas vidi Kalistoon eĉ per binoklo—serĉu ĝin!) La aliaj tri lunoj nomiĝas *Ganimedo*, *Eŭropo*, kaj *Io*.

## ULRIKA

*Danke al nia kunlaboranta redakcio ĉe Starto, gazeto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, mi ĝoje prezentas en nia bulteno novan tradukon de ĉeĥa beletraĵo, tre lerte enesperantigita. — Red.*

*verkis Alena MELICHAROVÁ  
elĉeĥigis Jaroslav KROLUPPER*

Vokas la patrino al Ulrika pete.  
Antaŭ momenteto ŝi ĉi tie estis,  
sed ŝi eble ie kun fratinoj restis.  
“Hoj, Ulrika, venis jen ministro Goethe!”

Kaj Ulrika kuras, sin al panjo ŝetas,  
poste ŝi kliniĝas tute bonkondute.  
La konata viro ŝin rigardas mute,  
lia olda buŝo larĝe ekridetas.

Tie ĉi hodiaŭ multaj homoj gastas.  
Venis la onklino rekte el Vieno,  
grafo Ŝternberk sentas sin jam indiĝeno,  
kiun Třebívlice bonvenigi hastas.

Gaja domo gastojn tenas en la sino.  
Kaŝas sin Ulrika, spiron mallaŭtigas.  
Ŝi rigardas, kiel ĉiujn bonvenigas  
kore la patrino, nobla baronino.

Ĉiu el la gastoj havas sian planon.  
Grafo Ŝternberk stalojn trarigardi venas,  
aliloke ludas la onklin' viena  
kune kun Ulrika la fortepianon.

Al tagmanĝ' invito venas ja senpere,  
oni post la manĝo tortojn tuj prezentas.  
Laŭ von Goethe ĉeĥa manĝo eminentas,  
li al baronino laŭdas ĝin sincere.

Kun Ulrika ankaŭ eta Amelia,  
la infanoj kiel damoj gravmienas:  
jen, ĉi-foje solaj inter gastojn venas.  
Vivo en kamparo estas emocia.

Ili tuj perdiĝas el gepatra vido,  
sekve servantaro ilin zorge vartas.  
Nur malgranda Berta certe ne apartas,  
restas ŝi de panjo dorlotata ido.

Konsilanto Goethe, krom poet' ministro  
filinetojn konas de la beba aĝo,  
ĉiam li bombonojn havas en bagaĝo  
kaj ilian kunon petas li pro distro.

Promenante, vante li ne pasas ion,  
li por floroj, arboj ĉiam nomon trovas,  
kvankam la knabinoj malkompreni povas,  
li parolas eĉ pri mineralogio.

“Jen, ĉi tie kuŝas ŝtono tre ornama!  
Ĝi aspektas vere kiel sangoguto,  
estas ĝi ŝtoneto bela sen disputo,  
en ĝi eĉ rebriloj kiel fajro flamas.”

“Tio ĉi, Ulrika, ja piropo\* ruĝa,  
nome ĝi grenato, bohemia ŝtono.  
Donas juvelisto al ĝi eĉ fasonon,  
se li kun kompreno ĝian belon juĝas.”

La agrablaj tagoj certe sin ne trenas,  
oni ja facile malplenigas glason  
kaj alvenas fine tempo de forlaso.  
Jen, kaleŝ' veturas, korte jam matenas.

Por Ulrika oni vojaĝveston gladas,  
el Strasburgo venos ŝi nur por ferioj.  
Goethe pri rokaĵoj serĉas novajn sciojn,  
al Komorní Hůrka ofte li venadas.

Ulrika Levetzow, nun jam damo juna,  
ne renkontis Goethe-n, nur lin pasis eble.  
Ŝi jam la studadon finis kaj kredeble  
konas ĉiam trovi vorton oportunan.

Tia juna damo rajtas post kvar jaroj  
al malgrandulino tute ne simili.  
Sekve en banloko ne rekonis ili  
unu la alian sur la trotuaro.

\**piropo*: speco de grenato, malhele ruĝa juvelŝtono

Konsterniĝis Goethe, li eĉ ne jubilas,  
la momento estis stranga pagadmono.  
Kiel florbūrĝono al florbūrĝono  
jen Ulrika plene al patrin' similas.

Kiel bela floro antaŭ li ŝi staras,  
estas de patrino bildo elokventa.  
Per beleco sia emocias, tentas.  
La patrino ankaŭ estis deksex-jara.

Vivan rememoron vekas ŝi galante,  
Goethe de ŝi estas plene fascinata.  
Li—virinspertulo, ŝanĝanima, sprita  
nur suspiras, miras, kapon balancante.

Poste li direktas salutrivencon  
ankaŭ al patrino, nobla Amalia,  
kaj starante rekte—viro memkonscia  
longe li rakontas, vera konferenco.

Kaj vespere Goethe iras al la fonto,  
akvo ebriga kiel vino estas.  
Lumo en fenestro de Ulrika gestas,  
eble ŝi konstruas al li luman ponton.

Ĉiam frumatene li kaj ŝi kunvenas  
kaj li al la fonto portas ŝian tason.  
Da donacoj havas li por ŝi amason  
kaj en sia koro kaŝe amon tenas.

Pasis la somero, kiu ebrigas,  
sed ŝin ne timigis lia ama voko...  
Vintre antaŭĝojis Goethe je banloko,  
Mariánské Lázně homojn interligas.

Li ŝin tra banloko ree akompanas.  
Jen: infan' Ulrika de la mond' ravata  
eĉ virino juna ŝi tre admirata.  
La poet' maljuna sin en moko banas.

Tion rigardante baronin' suspektas,  
ke perdiĝis ie juĝo kaj prudento,  
ke el amikeco jam estiĝis sento,  
kiun ĉe olduloj oni ne ekspektas.

Kial estas sorto tiom ĉi malica!  
Ŝi lin ankaŭ foje amis senrezulte,  
la filinon tamen amas ŝi pli multe.  
Sed al ŝi ordoni, tio ja ne licas.

Klaĉoj jam multiĝas, vera malbongusto.  
Krome en aferon multe da amaro  
metas arĥiduko, tiu de Vimaro,  
alidire onklo, jes, Karlo Augusto.

“Mia kara, Goethe, jen, de amo bolas,  
sekve kiu plago, kiu malbonsorto?  
Mi komprenas, aĝo: li pli frue mortos,  
mi pro tio renton al ŝi doni volas.”

La patrin' filinon vere tre favoras,  
tial ja ne volas, ke ŝi sen rezisto  
jesu al edziĝo kun iu sofisto,  
kiu ŝian belon malkaŝeme gloras.

“Tio ja ne estas iu pensbizaro  
de oldulo, tion devas vi kompreni:  
Goethe ja sopiras multe vin kunpreni  
kiel la edzinon hejmen al Vimaro.

Via patro, kara, povus li fariĝi,  
li jam estas vidvo, multe li influas,  
eĉ kun altranguloj ofte rendevuas  
—sed vi ne bezonas al li edziniĝi.

Hasti kun respondo estas nebezone,  
estas malfacile, tion mi ja scias,  
trovi elirsolvojn, kiuj harmonias  
kaj pri tio ĉion konsideri bone.”

Ĉu von Goethe vere tiom ŝin adoras?  
Ŝi subitan fridon sentis sub korsajo.  
Li nur portas al ŝi multe da dolĉaĵoj,  
estas li amiko, kiu ŝin favoras

—nu kaj plie tamen, li sufiĉe oldas!  
Kaj ŝi surprizita, plena de pudoro  
sub kovrilon kaŝas la knabinan ploron.  
Ŝi virinan sorton pro rankoro skoldas.

Ŝi, estante juna, je edziĝ' angoras,  
 ŝi eĉ ne inklinas tuj sin alivesti  
 por kortega damo, volas ŝi mem esti,  
 spite, ke ŝi Goethe-n vere tre favoras.

Li ŝin ja verdire sur la lipojn kisas  
 kaj ŝin al si premis foje en la balo,  
 versojn alportadas tiu najtingalo...  
 Pensoj tre impete saltas, zomas, glisas.

Ŝi lin ja ofendi certe ne scipovus,  
 estas li afabla, per komplez' dotita...  
 Longe ŝi cerbumas, longe ŝi hezitas  
 por ekkoni, kion fari ŝi ne povus.

Je bedaŭro menso pli kaj pli abundas.  
 Ŝi ja ne sukcesos lin pli esperigi,  
 eble ŝi preferus morti, sin mortigi,  
 kion ajn ŝi dirus, lian koron vundas.

Tempo maturiĝis kaj ŝi forvojaĝas.  
 Jes, al Třebívlice, al feŭdobieno.  
 Pala, sen koloro, plena de ĉagreno  
 alparoli Goethe-n ŝi ja malkuraĝas.

Ŝi sin senkulpigis. Certe ŝi respondos  
 kiam ŝi revenos hejmen por ripozi.  
 Kiel al ministro, kiel vortojn dozi?  
 Kiu tion scias el amikorondo?

Goethe deprimita. Triste li mienas:  
 tarda amo estas sorto de edeno,  
 li ne volas resti tute sen kompreno,  
 maljunaĝo ege, ege lin ĉagrenas.

Kaj ne imagebla ia kompromiso.  
 La poeto sian grizan kapon klinas  
 al subtilaj manoj, kiuj lin fascinas,  
 kaj retenas spiron dum varmega kiso.

Tempo ĉiam paŝas malrapide, lante,  
 kiam ĝi kun grava komunikado venas.  
 Goethe de ekscito daŭre sin detenas  
 super la letero, tuj ĝin malfermante.

Ĉu ŝi ne rifuzis al li korfavoron?!  
 Kaj ne sekretigas eĉ vestaĵo varma,  
 ke sub ĝi impete batas, eĉ alarmas  
 la suferigita trista olda koro.

“Aĥ, sinjoro Goethe, mi Vin vere ŝatas.  
 Malfacile por mi ĝuste decidiĝi,  
 ja entrudiĝinto mi ne volas iĝi  
 kaj edzinposteno estu dibenata.

Via filo vivas kun Vi en akordo  
 jam en Via domo kun la familio,  
 kaj facile povas eki kolizio  
 inter mia rolo kaj kutima ordo.

Se Vi estus sola, ĵure mi deklaras,  
 ke al Vi fidele volus mi utili,  
 kaj ne eblus al mi tion malkonsili:  
 pro mensforto Via eksterordinara.

Plue do solece estas mi vivonta.  
 Nome mi foriros, vole, sen lamento,  
 plena de feliĉo, de varmiga sento,  
 ke edzin' mi Via estis fariĝonta.”

Sed neniu karto kun respondo venis,  
 venis nur paketo, en ĝi du linioj,  
 ŝajne alskribitaj nur pro konvencio.  
 Kiel oni povas ilin subkompreni?

*Vi bonvolu preni mian donaceton  
 — ĝi Vin feliĉigu daŭre ĝis la fino...  
 Jen, grenatjuvelon donis la poeto  
 al Ulrika, sia lasta amatino.*

Ŝi ne edziniĝis, edzon ne deziris,  
 sola ĝis la morto, vivis ŝi sen viro:  
 ja neniam venis al ŝi kavaliro,  
 similanta Goethe-n, kiun ŝi admiris.

Apud Třebívlice tombo en tombejo.  
 Kaj sur tomboŝtono nomo gravurita:  
 Ulrika Levetzow. Ĝi fariĝis mita,  
 de okazintaĵo ŝtona deponejo. ★

# Traduku!

Nia teksto ĉi-foje estas poemo de Elizabeth ALEXANDER, kiun ŝi legis dum la inaŭgura ceremonio de Barack OBAMA. Temas pri poemo laŭ stilo de “libera verso”, sen rimo kaj sen facile rimarkebla ritmo... mankis entute la defio de rimado. La ĉefaj defioj de la teksto troviĝas en la provo traduki kelkajn neprecizajn esprimojn, kaj en la serĉo por esperantaj formoj por pluraj anglaj sinonimoj.

Ni ricevis kvar tradukojn... ne multe, sed sufiĉe por komento kaj esplorado. Ni scivolas, tamen, ĉu homoj simple ne volas partopreni la “ludon”, ĉu ne plaĉas al kelkaj niaj elektoj de materialo, aŭ ĉu estas aliaj kialoj por la malgranda partoprenantaro. Plaĉus al ni ricevi viajn ideojn kaj reagojn—kaj same ni bonvenigus viajn proponojn pri (mallongaj) tekstoj por estontaj rubrikoj.

Pri “liberaj versoj”, la *Parnasa Gvidlibro* de KALOCSAY, WARINGHIEN, kaj BERNARD suprenlevas la nazon... La aŭtoroj ŝatas klasikajn formojn kaj stilojn, kaj taksas liberajn versojn iom neindaj. Temas pri “lirikaj pecoj, arbitre dividitaj en serio de pli-malpli longaj linioj, en ĉiu el kiuj oni vane serĉus ian elementon de ordo... La solaj ecoj, kiuj iel distingas tiajn pecojn disde simpla prozo, estas ia denseco de la lingvo kaj intermeto de silento ĉe la fino de ĉiu linio—sed ĉu tio sufiĉas por konsistigi versojn?” Kaj poste ili komentas: “Tamen devas ekzisti por la prospero de tiu ĝenro aliaj motivoj ol la facileco de la verkado. Eble la kreskanta graveco de la vidaj komunikiloj super la aŭdaj faras, ke alineado ŝajnas al junaj poetoj pli efeka ol ritmo kaj rimo, kaj ili deziras, kiel ĉe la ĉinaj ideogramoj, paroli al la okuloj pli ol



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko Lee kaj Tim prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ili faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Bonvolu sendi ne plurajn diversajn provojn, sed **nur unu** tradukon **antaŭ la 15-a de Aŭgusto** al:

**[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)**

la oreloj...” (p. 54)

Pri la poemo de ALEXANDER, ni pensas malsame. Ne tiom gravas la aspekto sur la paĝo (kvankam tio povas esti parto de la afero)—gravas la sono de la teksto dum laŭtlegado, kiel oni prononcas kaj emfazas apartajn vortojn, kie oni paŭzas, kiel oni similigas unu frazeron al alia per sono kaj voĉo. Tion kapti sur papero ne eblas; la skriba poemo en unu senco estas nur gvidilo, kaj la poemo estiĝas (kaj reestiĝas) dum laŭtlegado. La poemo fakte estis deklamita dum la inaŭgura ceremonio.

Kaj en ĉi tiu poemo ja kuŝas strukturo ne precize proza. Ĉefe la strukturo estas:

Frazero A,  
subfrazero b,  
subfrazero c,  
subfrazero ĉ.



Ekzemple:

- (A) Each day we go about our business,  
 (b) walking past each other,  
 (c) catching each other's eyes or not,  
 (ĉ) about to speak or speaking.

Tiel oni povas distingi la versojn kaj la strofojn. Tiom regulstrukture oni ne kutime verkas en ordinara prozo.

Nu, ek al diskuto de l' tradukoj.

**Each day we go about our business**—Jen ne tre preciza diraĵo en la angla. Ne vere temas pri *business* en la senco de komerco aŭ negoco (kvankam tio ja povus esti la signifo, laŭ kunteksto). Temas pri tio, kion ni kutime—aŭ eble nekutime—faras. Kaj *our business* emfazas ke temas pri niaj propraj farindaĵoj. La tradukistoj proponis: *ni okupiĝas pri la propraj aferoj*, *ni faras nian rutinon* (sed supozu, ke tio kion mi faras hodiaŭ ne estas laŭ rutino... ĉu ne ankaŭ tio estas mia *business*?), *ni celas niajn proprajn taskojn*, kaj *ni zorgas pri la propraj aferoj*. Ni scivolos ĉu ne sufiĉus diri *Ĉiutage ni okupiĝas*. Ĉu eblus krei novan um-vorton? *Ni aferumas*?

**catching each other's eyes or not**—Interesa esprimo. La tradukoj havis *trafante l'alies rigardon*, *rigardante okulojn*, *rigardante en la okulojn*, *ekvidante unu la alian*. Ĉu temas ĉi tie iel pri *agnoski*, *rekonii*, aŭ *ekkonscii*? Ĉu eblus *intertuŝigante okule*? *trafante unu la alian rigarde*? *ĵetante reciprokajn rigardojn*? *reciproke rigardante*? *ekkonsciante pri l'alies rigardo*?

**about to speak or speaking**—Preskaŭ ĉiu elektis *parolonte*, *parolante*. La frazparto en Esperanto bele spegulas la anglan originalon, sed ĉu la diferenco de unu litero—o al a—estas tro subtila por la oreloj? Ĉu oni kaptus la ŝanĝon dum laŭtlegado?

**all about us is noise**—Ĉiu tradukprovo uzis *ĉirkaŭas nin bruon*, uzante aktivan verbon kaj akuzativon. Kio pri *ĉirkaŭe estas bruon*?

**noise and bramble, thorn and din**—Kiel diferencigi *noise* kaj *din*, *bramble* kaj *thorn*? La angla tiom riĉas per sinonimoj ke oni povas libere elekti el granda gamo; ne estas tiel en Esperanto. Ekzistas nur *bruo*, ĉu eta, ega, aĉa. Niaj tradukistoj donis la jenajn parojn: *bruo/bruego*, *bruo/bru'*, *bruo/muĝado*, kaj *bruo/debato*. Por *bramble* kaj *thorn* ni ricevis *vepro/dorno*, *dornarbusto/dorn'*, *dornarbustoj/dornoj*, kaj *bariloj/dornoj*. Kion vi opinias pri elektoj kiel *muĝado*, *barilo*, kaj *debato*? Ĉu tio tro multe devojiras de la originala teksto?

**stitching up a hem**—*ĉirkaŭkudras orlon*, *kudras vestorandon*, *prikudras orlon*, kaj *kudras orlon*. Neniu pensis pri verba *orli*: *iu orlas vestaĵon*.

**darning a hole**—*flikas ŝiritan uniformon*, *ŝtopas truon en*, *flikas truon*, *fermas truon*.

**repairing the things in need of repair**—*riparas tion*, *kio riparendas*, *riparas la aĵojn riparendajn*, *difektitaĵojn oni sendifektigas*, *riparas la riparindaĵojn*. Tiu ĉi frazo bele redoniĝas en Esperanto pro niaj sufiksoj *-end-* kaj *-ind-*.

**make music**—Du tradukprovoj uzis *krei muzikon*, aliaj *muzikumi*. En la angla, *make music* havas pozitivan karakteron—harmonio, beleco, kunlaboro. Ĉu tiu sama emocio sentebblas per *krei muzikon* aŭ *muzikumi*? Ĉu tio gravas al la poemo? Ĉu eblus simple *muzikis*?

**boombox**—Jen problema vorto! Temas pri portebla muzikludilo (nur por jam registrita muziko, ne muzikinstrumento), sed por multaj anglalingvanoj, ĝi ligiĝas al certa jardeko de muziko, kiu formortis kiam iPod-oj ekaperis. La ĉefaj vortaroj

angla-Esperanto ne proponas tradukon por *boombox*. Niaj tradukintoj proponas *kasedilo*, *radio*, kaj neologisme *bumbokso*. Kiun elekton vi plej ŝatas?

**We encounter each other in words**—Tiu ĉi frazo ekspluatas la malprecizan signifon de *in* en la angla. Unu tradukinto uzis simile svagan esprimon *vorte*, aliaj uzis *per*. Sed tiu prepozicio eble estas tro klara.

**words shiny or smooth**—*dornaj aŭ glataj, pikaj aŭ glataj, veluraj aŭ vundaj*.

**words to consider, reconsider**—La tradukprovoj uzis malsamajn aliajn alirojn—du uzis *re-* samkiel la angla: *vortoj por pripenso, repripenso*, kaj *vortoj konsiderindaj, rekonsiderindaj*. La aliaj provoj uzis *vortoj pensindaj, pentindaj* kaj *vortoj pensigaj, pripensindaj*. Kiu aliro plej plaĉas al vi? Ĉu konservi la *re-*formon de la originalo, aŭ riski *pentindaj*?

Jen la originala teksto kaj provo al sin-teza traduko:

## Praise Song for the Day

Each day we go about our business,  
walking past each other,  
catching each other's eyes or not,  
about to speak or speaking.

All about us is noise.

All about us is noise and bramble,  
thorn and din,  
each one of our ancestors on our tongues.

Someone is stitching up a hem,  
darning a hole in a uniform,  
patching a tire,  
repairing the things in need of repair.

Someone is trying to make music somewhere,  
with a pair of wooden spoons on an oil drum,

with cello, boom box,  
harmonica, voice.

A woman and her son wait for the bus.  
A farmer considers the changing sky.  
A teacher says,  
*Take out your pencils. Begin.*

We encounter each other in words  
words spiny or smooth,  
whispered or declaimed,  
words to consider, reconsider.

## Laŭdkanto de l' Tago

Ĉiun tagon ni okupiĝas, aferumas,  
preterpasante unu l' aliajn,  
trafante l' alies rigardon. Aŭ ne.  
Parolante aŭ ekparolonte.

Ĉirkaŭe estas bruo.  
Ĉirkaŭas nin bruo kaj vepro,  
dornoj kaj muĝado,  
ĉiu prapatro sur la lango.

Iu orlas vestaĵon,  
flikas ŝiritan uniformon,  
ŝtopas pneŭotruon,  
riparas la riparindaĵojn.

Iu ie penas muziki,  
per ligna kuleroparo sur naftobarelo,  
violonĉele, bumbokse,  
buŝharmonike, voĉe.

Virino kaj filo atendas aŭtobuson.  
Terkultivisto atente rigardas ŝanĝantan  
ĉielon.  
Instruisto ordonas,  
Elprenu la skribilojn, ek.


Ni renkontas unu l' aliajn per vortoj,  
vortoj pikaj au glataj,  
flustraj au deklamaj,  
vortoj pensindaj, pentindaj.

Por la sekva defio, ni proponas tekston el la 19-a jarcento—la enkondukan alineon de *A Tale of Two Cities* de Charles DICKENS:

It was the best of times, it was the worst of times, it was the age of wisdom, it was the age of foolishness, it was the epoch of belief, it was the epoch of incredulity, it was the season of Light, it was the season of Darkness, it was the spring of hope, it was the winter of despair, we had everything before us, we had nothing before us, we were all going direct to Heaven, we were all going direct the other way—in short, the period was so far like the present period, that some of its noisiest authorities insisted on its being received, for good or for evil, in the superlative degree of comparison only.



## Hazarda Esperanto



Taso de *Panera*, ĉeno de bakejo-kafejoj troveblaj diversloke tra Usono. En Sankta Luiso la sama firmao nomiĝas *St. Louis Bread Company*, sed ĉiukaze ĝia pano estas foje en multaj pecoj...  
(Foto: dankon al Christopher ZERVIC)

## Solvo de la krucvort-enigma el numero 2009/2

	M	A	P		S	E	S		E	T	A			
	P	O	Z	I		A	R	E		S	O	L	E	
1	I	L	I	A		T	I	K		T	R	I	B	
1	P	E	O	N	O		K	V	A	R	T	A	L	
				I	S	T		I	G	I				
2	K	O	N	S	T	E	R	N	I		P	E	R	
1	T	R	E	T		R	O	B		C	A	R	O	
1	P	O	P		T	E	L	E	V	I	D	O	S	
				B	O	T		R	I	F				
3	P	A	R	O	L	A	D		D	E	C	A	S	
4	A	B	O	N		G	O	J		R	I	Ĉ	A	
4	V	A	K	U		O	K	A		O	R	E	L	
				K	O	L		J	O	D		J	O	T

Ĉi-numere la krucenigma ferias, sed ne timu, krucvorto-maniuloj: ĝi revenos venontfoje, revigligita kaj eĉ pli ruze enigma ol kutime. Intertempe la redaktisto ĝojegas, ke la kvanto da solvintoj daŭre kreskas. Alvenis al la redakcio ĉi-foje dek ok solvoj!

Elkorajn gratulojn al George BAKER, Anna BENNETT, Brian Neil BURG, Randy DEAN, Ellen EDDY, Keneĉjo GOLDBERGO, Vilĉjo HARMON, Arlyn KERR, E. James LIEBERMAN, Peter MCCORQUODALE, Sandra MILLER, William PATTERSON, Mark RAINEY, Dave RUTAN, Jakobo SCHWARTZ, J. Edsall STRICKLAND, kaj Russ WILLIAMS.

Kaj apartan gratulon ĉi-foje al Mike DONOHOO, kiu gajnis la premion. Gratulon, Mike!

### STRANGA SONGŬO

Marŝalo de kavaleri'  
multe havas ĉevalojn, li.

Fekaj' amasiĝas alte, kiel  
mont' kreskanta ĝis la ĉiel'.

—George BAKER

# Novaj varoj ĉe la libroservo

All books listed can be ordered online at <http://esperanto-usa.org/retbutiko> or by mail from Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530. For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock, you can request that the online bookstore notify you by email when the item is available. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



## FEK AL ESPERANTO

**La Pafklik.** La unua albumo de hiphopo en esperanto. Ĝi estis registrita en la studio de Vinilkosmo en Tulujo, kaj la tekstoj estis

korektitaj kaj reviziitaj. La kantoj estis verkitaj de Platano kaj Katakana, muziko estis produktita de Katakana krom la jenaj instrumentaroj: Forkapta Operaco, Fek al Esperanto, La Povo, Fek al Esperanto (G-funka versio). La disko daŭras 52 min. **\$29.70**



## MORTO DE ARTISTO

**Anna LÖWENSTEIN**

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan

vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj. Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro. Kudre bindita. 2008. 624 p. 135 x 205. Belgium. Stafeto n-ro: 33. ISBN: 978-90-77066-39-3. **\$34.10**



## PAOLO—LA LERNANTO DE LEONARDO DA VINĈI

**Hans ULRICH, trans. Benata HENGSTMENGEL-KOOPMANS.** Story of a boy living during the confusion of a bitter battle for power in France. **\$15.00**



## LA ASOCIO

**Ziko VAN DIJK.** Universala Esperanto-Asocio estas konata kiel la plej granda organizaĵo en la movado, kun revuo, jarlibro kaj kongreso. Sed kio okazis malantaŭ la kulisoj? Danke al la Arkivo de UEA nun eblas prilumigi

strukturojn kaj epizodojn el la historio de la monda Asocio, de la komenco ĝis la 1960-aj jaroj. Tiu ĉi libro kunigas tri iom grandajn studojn, pri Biblioteko Hector HODLER, la statutoj de la Asocio kaj la Historioj de Esperanto. Cetero ĝi enhavas mallongajn, leĝere verkitajn kontribuojn pri eventoj aŭ koncizaj temoj: la centraj oficejoj, la Respondkuponoj, germanlingvaj nomoj en la Jarlibro, britaj plendoj kontraŭ Edmond PRIVAT, la Universala Kongreso en Italujo kaj Afriko, prezidantoj STETTLER kaj BASTIEN, la krimo de la kongresa sekretario, arkivaĵoj en forno, FIGHIERA en komunista Varsovio kaj la kialo, ke Ivo LAPENNA ne fariĝis heroo de Novjorko. kudre bindita. 2008. 302 p. 135 x 205. Belgium. ISBN: 978-90-77066-37-9. **\$40.90**